

## MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr (inkl. sendkoston), je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. Abono akceptata. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 int. respondkuponoj. Nroj 1/43 kaj 2, 3, 4/44 vendataj por po 0,55 kr. — Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝtokonto 26 80 23.

PREZO: 1:— Kr.



# MALGRANDA REVUO

N:RO 1

1947

5-a JARO

### ENHAVO:

	Pago
AL LA JUDA FORIRINTO, de L. C. Dej	1
LA LASTA NUMERO?	2
KOMUNECO, de Stellan Engholm	3
SUR LA SOJLO DE NOVA JARO, de J. Kohen-Cedek	8
RICHARD WRIGHT, de Stellan Engholm	13
EL "BLACK BOY" de Richard Wright	17
UNIKA ASTRONOMIA OBSERVEJO, de John Moffat	28
LITERATURO	31

*Redaktoro — Eldonanto:*

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

## Al la juda foririnto

De L. C. DEIJ

Li fermis la kofron, manpremis — adiaŭ!  
Sen ia protesto li iris... Hodiaŭ  
mi tion komprenas: li povis nur miri,  
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kun kapo klinita la kofron li portis.  
Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis  
sen ia protesto... Li povis nur miri,  
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kaj iam la filo kun filo parolos,  
kaj tiu demandos, la veron li volos.  
La mia silentos... kaj povos nur miri,  
ke mi, lia patro, lin lasis foriri.

Ni sentis kompaton kaj monon kolektis,  
dum kelkaj el ni la infanojn protektis.  
Sed Auschwitz *ekzistis!* Nu, kion plu diri?  
Ke mi kaj ke vi... ni lin lasis foriri.

## La lasta numero?

La legantoj de tiu ĉi nro de MR eble malkontentiĝas vidante ke ĝi estas nur 32paĝa, dum la antaŭa nro estis 48paĝa. Por ke miskompreno ne okazu, mi klarigu la aferon.

Mi faris nron 4/46 48paĝa sole el reklama vidpunkto. Mi pensis, ke oni pli volonte aĉetos la revuon, se ĝi estos pli ampleksa kaj varia. Ekonomie tio ne estis racia afero. Eĉ kun ĉiu ekzemplero vendita restus deficitio de almenaŭ cent kronoj. Sed kompreneble mi kalkulis pri estonta pli granda vendonombro.

Tamen ankaŭ la reklama vidpunkto montriĝis falsa. Anstataŭ aĉeti pli multe de tiu nro, oni malpli multe atentis ĝin. Ĝis nun, du monatojn post la apero, estas dissenditaj por vendo entute nur 330 ekz. Meza cnspezo por vendita ekz. estas ĉ. 0,75 kr. La 600 presitaj ekzempleroj kostas inkluzive honorariojn kaj afrankojn ĉ. 550 kr. Ankaŭ de la antaŭa nro restas ĉ. 200 ekz. Per tiuj ciferoj mi nek almozpetas nek plendas pri malsukceso. Mi volas nur komprenigi, ke ne estas facile eldoni esperantan revuon, kaj klarigi, kial mi eventuale ne povos daŭrigi la eldonadon.

Per Malgranda Revuo mi provis krei modestan kulturan revuon en esperanto. Mi pensis, ke la esperantistoj, portantoj de nova, tuthomara kulturo, bezonas organon, kiu kunligos ilin en tiuj klopodoj kaj esprimos iliajn aspirojn kaj laborojn. Ŝajne mi eraris pri tiu bezono. La revuo ofte estis ne kontentige bona. Manko de manuskriptoj kaj mono ne ebligis tiel altan kvaliton kaj varion, kiel mi deziris. Tamen mi almenaŭ tenis la direkton.

Se mi estus uzinta same multe da energio kaj mono por eldoni gazeton kun rakontoj pri murdoj, amo kaj romantiko, mi certe estus multe pli bone sukcesinta.

Se la vendonombro ne plialtiĝos, tiu ĉi numero estos la lasta. Mia ekonomio ne permesas daŭrigon. Cetere estus ja sence eldoni revuon por neekzistantaj legantoj. En okazo de

ĉesigo mi kompreneble resendos la bonhavyon de abonintoj. Al verkantoj, revendantoj kaj fidelaj legantoj mi dankas pro ilia helpo en mia provo.

Pro malsano tiu ĉi numero malfruiĝis tri semajnojn.

S. Engholm

## Komuneco

De STELLAN ENGHOLM

Ni volas kunligi la homojn por paca kaj harmonia kunvivo. Tamen ni apenaŭ demandas nin, kiuj aferoj ligas homojn kaj popolojn unu al alia. Ke niaj nuraj vortoj kunligos ilin, eĉ se la vortoj estas esperantaj, estas tro pretenda espero.

La homoj sensignife malmulte kunlaboras kaj havas komunecon en la senco de nia celado: tutmonda paco kaj popola interfratiĝo. Sed senserĉe ni trovas milojn da ekzemploj pri komuneco kaj kunlaboro en malgranda skalo kaj ankaŭ en ampleksaj formoj. La natura bazo de kunlaboro en malpli granda formo devas esti bazo por ĝi ankaŭ en la plej ampleksa formo.

Tiaj komunlaboraj grupoj estas diversspecaj liberaj organizoj, komunumoj, eklezioj, ŝtatoj ktp. Ĉiuj homoj estas membroj de almenaŭ kelkaj tiaj grupoj, ofte de multaj. Kio kunligas la membrojn de tia grupo? Kio igas nin senti certan simpatian unu al alia kaj kune labori por certaj celoj?

Estas niaj komunaj interesoj, kiuj nin kunligas, tio, kion ni komune posedas. La komunposedaĵoj povas esti kaj materiaj kaj spiritaĵoj.

La pratipo de komungrupo estas la familio. La membroj de familio posedas komune diversajn materiajn kaj spiritaĵajn aferojn. Tial la propra familio estas pli grava ol iu alia. En pasintaj tempoj aparteno al iu familio signifis ankaŭ certan singardon rilate al aliaj kaj ofte malamikecon kontraŭ ili.

En la duaŝtupa tia homgrupo, la tribo, la singardo kontraŭ aliaj similaj grupoj estas evidenta. La materiaj interesoj de la tribanoj kaj same iliaj lingvo, moroj, kredoj, pensmanieroj estas iliaj komunposedaĵoj. Tiuj komunposedaĵoj kunligas la tribanojn por komunprofita materia laboro kaj komunprofita spirita okupiĝo.

La komunposedaĵoj kunligas. Ili ankaŭ disigas. La havojn de la propra tribo alia tribo ne rajtas tuŝi. Sed se oni povas mem pliriĉigi sin je kosto de alia tribo, oni ofte faras tion. Tio estas por la bono de la komungrupo, kaj oni prenas de homoj, kun kiuj oni havas nenion komune.

Ankaŭ la spiritaĵoj komunposedaĵoj disigas de aliaj grupoj. Anoj de alia tribo kun alia lingvo, aliaj moroj kaj kredoj estas fremdaj, pli malpli nekompreneblaj. Kun ili oni devas ne miksiĝi.

Same estas en la moderna socio. Niaj regionoj, komunumoj, provincoj kunligas nin ne tiel sortograde kiel iam la triba regiono kaj la tribaj apartecoj, tamen ili multilate ligas. Vole ne vole ni havas pli da pozitiva sento por tiuj grupoj, al kiuj ni rekte apartenas, ol por aliaj. La disiga forto tamen ne estas granda tic. Sed ĝi ankoraŭ vivas kaj forte vivas. Ni retrovas ĝin en niaj rilatoj al ŝtatoj, klasoj, kredoj, ideoj.

Komuna posedo de materiaj kaj spiritaĵoj aferoj do kunligas nin kun homoj en multaj grupoj kaj rondoj, disigas nin de aliaj. Granda ludo de altiraj kaj forpuŝaj fortoj influas al ni kaj nia tuta vivo. La interesojn de la grupoj ne tro grandaj ni ordinare sukcesis harmoniigi. Sed inter la grandaj grupoj, ŝtatoj, klasoj, eklezioj, regas ankoraŭ rivaleco kaj malamikeco. Ĝis nun ne ekzistas komunposedaĵo, kiu en menciinda grado povas kunligi ĉiujn homojn en la mondo.

Rigardu la nunan pacolaboron! Oni solene deklaris, ke oni faros bazon por tutmonda paco kaj justo. Konsiderante tiun aserton en rilato al la realo ni devas diri, ke la laboro por tiu celo aŭ estas plejparte blufado aŭ montras mankon de kapablo. Bazo por tutmonda paco kaj harmonio povas esti nur interesoj kaj aferoj komunaj por la tuta mondo. Ĉu oni provis krei tiajn? Ĉu oni eĉ permesis liberan evoluon al tiaj fortoj, kiuj laboras aŭ povas labori en direkto al tiu celo? Ne, la tuta in-

tertraktado pri paco ilustras antaŭ ĉio, kiel la gvidantoj de ĉiu unuopa ŝtato pensas kaj agas por la interesoj, kiujn ili havas komune kun siaj samŝtatanoj. Ne estas mirige, ke estas tiel. Temas ĉiuflanke pri materiaj interesoj de la propra grupo kaj pri la propragrupa ideologia konfeso. Estas iluzio labori por tutmonda komuna bono, kiam oni ankoraŭ ne havas ion komune, nek materie nek spirite.

Ĉiu asertas, kaj prave laŭ sia pensmaniero, ke lia celo estas feliĉo al ĉiuj en la mondo. Tion asertis ankaŭ Hitler. Sed la homoj en aliaj landoj ordinare ne ŝiris la kunligon kun siaj propraj landoj, kredoj, pensmanieroj por transiri al kunposedo de la materiaj kaj spiritaĵoj valoroj de la tria regno. La kaŭzo de tio estas ne nur justosento. Tion justaj la homoj ordinare ne estas. La simpla kaŭzo estas, ke ili preferis siajn proprajn komunposedaĵojn kaj valorojn, same kiel infano preferas tion, kio apartenas al la propra familio. Tio estas fakto de la reala vivo, afero dependa de la cirkonstancoj de nia ekzisto. Kaj tial estas iom nenormalaj homoj, sen radikoj en sia medio, sen efektiva kunligo kun la propra komuneco, kiuj en tiaj tempoj transsaltas de propra grupo al alia.

Ni troviĝas ankoraŭ en la sama situacio. La gvidantoj de ĉiu ŝtato laboras unualoke por sia interesogrupoj. Due ili konsentas aŭ eĉ deziras feliĉigi ankaŭ la ceteran mondon, sed tio devas okazi laŭ la intereso de la propra komuneco. Kaj se ili eventuale volas nepre feliĉigi la aliajn popolojn, sed tiuj volas resti feliĉaj en sia maniero, restas al la unuaj nur englutiti la aliajn. Estas malnova historio.

Same estas rilate al multaj spiritaĵoj valoroj. Dogmoligita kristano — same kiel ĉiu alia religiulo en la mondo — certe deziras juston kaj feliĉon al ĉiuj homoj kaj popoloj. Jes, sed ili devas fariĝi kristanoj. Ano de hinduismo, budhano, islamano, eĉ naturreligia negro, povas esti bona, respektinda, eĉ justa homo. Sed kiam li ankoraŭ ne estas kristano, posedas kune kun ni nian eklezian dogmokredon, li ne estas, kiel li devus esti. Eble ni ne diras kiel niaj prapatroj kaj eĉ gepatroj, ke li por eterne brulos en la infero. Ĉiuokaze li tamen ne havos lokon en la rondo ĉirkaŭ Dio. Kie li estos, apenaŭ interesas nin, se li ne volas transiri al nia kredo. Li estas fremdulo, pagano,

"naciato". La tria pensmaniero ne malaperis! Kunlaboroj de diverskredanoj de tia speco sukcesas same bone kiel kunlaboro inter ŝtatgvidantoj, kiuj pensas sole laŭ siaj propraj ideologioj kaj la apartaj interesoj de la propra ŝtato.

La grupa pensmaniero estis kaj estas ĝis certa grado laŭ-natura. Per tia kunligo homoj kaj grupoj akiris rezultojn, kiujn ili ne estus atingintaj per individuaj klopodoj. Sed kion diri pri ni, kiam ni persiste pravigas niajn ideojn kaj kondamnas aliajn, kvankam ni jam rimarkis, ke niaj propraj kredoj kaj konvinkoj ne estas absolute veraj, ke vero povas kaj devas troviĝi ankaŭ ĉe aliaj? Kion diri pri religiano, kiu diras: "Ni estas elektitaj de Dio. Al ni li donis ĉiujn necesajn informojn pri si kaj pri la tuta ekzisto. Tial niaj konceptoj estas absolute pravaj, kaj nur ni estas pravaj. La aliaj eraras. Se ili ne transiros al niaj konceptoj, ili estos kondamnataj."

Se nuntempa homo tiel diras, li estas aŭ hipokritulo aŭ spirite blinda. Ni komencas kompreni, ke ni tre malmulte scias, ke ni estas etaj infanoj antaŭ la grandaj sekretoj de la ekzisto, ke vero kaj sincera klopodo povas troviĝi ankaŭ en aliaj grupoj, ke la vivo verdire estus sensenca, se ili ne estus kun ni egalrajtaj infanoj de la ekzisto. Ĉu en tia okazo ne estas granda fiero kaj stulteco pretendi, ke ĝuste ni estas la solaj, kiuj pravas, ke ĉiuj devas adaptiĝi al ni?

Estas same, kiam anoj de unu ideologio pretendas, ke ili solaj pravas kaj senkondiĉe pravas. Ĉiuj aliaj estas falsaj, ridindaj, pafindaj perfiduloj, ili apartenas al la diablo. Anoj de ideologioj pretendas esti la plej evoluintaj kaj klare pensantaj homoj en la mondo. Tamen estas pli facile eltiri el dogma religiano la konfeson, ke li ne ĉion komprenas, ol eltiri el dogma ano de ideologio, ke troviĝas obleco, ke li povas erari en siaj konceptoj. Kaj ne nur tio. Ĉar ĉiuj aliaj eraras, ili devas aŭ konvertiĝi aŭ malaperi.

\*

Se oni konfidus al la esperantistoj decidi pri internacia kunlaboro por paco, ili certe solvus tiun problemon pli bone ol la nunaj ŝtatgvidantoj. Verŝajne ili ne agus en ĉio praktike, sed ilia laboro estus multe pli proksima al efektiva kunlaboro.

Alia afero estas, ĉu la popoloj en la nuna ŝtato konsentus pri la aranĝoj de la esperantistoj.

Kial la esperantistoj pli laŭcele solvus tiun problemon? Ĉar ili jam posedas ion komune, kio por multaj estas kaj por ĉiuj povus esti tuthomara komunposedaĵo. Tiel ili jam adaptiĝis al vere supernacia rigardmaniero. Nia lingvo verdire estas la unua afero en la tuta homa historio, kiu fariĝis posedaĵo de homoj el ĉiuj ŝtatoj, ĉiuj kredoj, ĉiuj diversaj interesosferoj. Tiel fariĝis, ĉar ĝi montriĝis valora por ĉiuj, malutila al neniu. Kaj tiel ĝiaj adeptoj atingis en certaj rilatoj tuthomaran komunecon, kiu subordigas kaj harmoniigas antaŭe disigajn interesojn. Ili trovis komunposedaĵon, kiu por ili estas pli valora ol la intercoj de la disaj grupoj malgrandaj aŭ grandaj.

Lingvo en si mem ne estas tiel grava komunposedaĵo, ke ĝi superregas la influon de aliaj gravaj faktoroj. Ke ĝi tamen estas sufiĉe grava, montras la fremdiga, proksimiĝomalhelpa influo al anoj de diversaj lingvoj.

Pli ol nia lingvo en si mem kunligas tiu ideo, por kiu ĝi estas esprimo. Krom lingvo kaj ideo ni havas kiel komunposedaĵon tiujn aferojn, kiujn ni per ili kreis: organizojn, literaturon, kongresojn, pensmanierojn, historion. Tiel nia komunposedaĵo estas taŭga bazo, kaj la unua, por tutmonda laboro por paco kaj popola fratiĝo.

Tamen ĝi estas tute sensignifa rilate al la agado en la mondo. La plej multaj homoj apenaŭ scias, ke la lingvo kaj la movado ekzistas. Malgranda parto scias pri ni sed rigardas nian aferon kiel ridindaĵon, kiel sensencan kromokupon por certaj stranguloj.

Tiun sintenon de la eksteruloj ni ne povas ŝanĝi sole per afiŝoj, flugfolioj, steloj sur la brustoj, vivukrioj por esperanto. Tiaj aferoj estas bonaj kaj parte necesaj por sia speciala celo, sed sole per ili ni ne atingos tion, kion ni volas. Per lerta reklamo oni povas igi la homojn aĉeti maĉogumon kaj aŭtomobilojn de certaj markoj. Sed per reklamo oni povas fari nek veran kristanon, nek alian etikan homon, nek veran adepton de niaj ideoj. Ne per reklamo oni klarigas kaj konvinkigas sed per agoj en la servo de la ideo.

Nur kiam ni en seriozaj volo kaj laboro konstruos pli da evidente sencohavaj aferoj kun internacia signifo oni atentos pri ni, komencos respekti nin, deziros nian helpon. Nur per propra laboro ni atingos tion.

Niaj komunposedaĵoj ne estas pretaj sed konstruotaj. Por sukcesi en tio estas necesaj solidareco, fideleco al la komuna celo, singardo kontraŭ inerto, oferemo. Antaŭ ĉio estas necesaj plialtigo kaj plintensigo de la spirita vivo. Malmulte helpas steloj, flugfolioj kaj belaj vortoj pri la Majstro kaj la interna ideo, se ni mem restas tro inertaj por tolereble lerni la lingvon. Malmulte helpas almozpetado ĉe eksteruloj kaj petskriboj al altaj aŭtoritatoj, se ni ne per ĉiuj fortoj subtenas tion bonan, kio jam ekzistas, proprigante al ni la bonan en tio, kio ĝis nun estas konstruita, konstruante novajn komunposedaĵojn, kiuj estos ne nur por tempopasigo sed por efektiva komuna bono kaj al ni kaj al aliaj.

## Sur la sojlo de nova jaro

De KOHEN-CEDEK

En la haladzo de la lastaj decembraj festoj kaj festenoj formortis en agonaj konvulsioj la 1946a jaro.

Frakvestitaj viroj kaj sincerkore dekolitaj virinoj sidis tiam ĉirkaŭ lukse aranĝitaj tabloj. Kiam la horloĝo sonorigis la dekdu batojn, ili gajanime intertuŝis la plenajn ĉampanpokalojn, gratulis sin reciproke kaj diris multpromesajn tostajn bondezirojn.

Aliaj, maskitaj per plej diversaj maskobalaj kostumoj, penante forgesi siajn pasintajn kaj minacantajn zorgojn, pasigis la jarfinan vesperon en dancuragano laŭ sovaĝritma, obtuza bruo de raŭka ĝazbando.

Sur ĉiuj ĉefstratoj de eŭropaj grandurboj miloj da homoj nefirme paŝantaj laŭte kantis, nekutime vigle gestis kaj krie

intersanĝis gratulojn. Soldatoj en ĉiuspecaj uniformoj, el ĉiuj fakoj de tiu nobla homeksterma metio, versaĵne ĉie skandalis kaj diboĉis.

En vino, movoj, flirto, muziko, bruo kaj vortotorentoj penis homoj dronigi sian penton pri la pasinto kaj sian timon pri la estonto.

Sed samtempe aliaj centmiloj da ĉifonvestitaj homoj sidis mutaj en malhelaj anguloj de siaj domruinoj kaj malsataj tremis pro frostoj.

Tiel komenciĝis la nova jaro, jam la dua postmilita jaro.

Dum la tuta pasinta jaro la ĥaosa mondo ankoraŭ ne komencis kuraci siajn vundojn. Ankoraŭ ne venis la sopirata periodo de mondrekonstruo. Tra densa mallumo de pasintaj suferoj ankoraŭ ne aŭdiĝis la revelacia proklamo pri reciproka amikiĝo kaj intergenta fratiĝo. Nia interkompreniga idealo ankoraŭ restas voĉo vokanta en dezerto.

Male: la mondo estas hodiaŭ eĉ pli disŝirita, pli disigita ol antaŭe. La solvotaj problemoj estas pli danĝeraj kaj pli urĝaj, dum la solvoj fariĝas pli komplikitaj, pli dubaj kaj pli malproksimaj.

Rekonstruo kaj spirita renaskiĝo ne venis, sed minacas nin nova ondo de detruo. Jam rompiĝis la lastaj ligiloj de komuna fido, kiu antaŭ nelonge ligis la grandpotencojn dum iliaj kunaj batalstreĉoj. Tremas la fundamentoj de la etikaj moralprincipoj, sur kiuj baziĝis ĝis nun la esperoj de la laca homaro. Sekiĝis la lastaj fontoj de espero. Plej sanktaj promesoj, plej solenaj ĵuroj montriĝis nenionsignifaj paperpecoj. Evito de respondeco, perforto kaj perfido en ilia plej abomena, friponaspekta nudeco ekregis en la mondo.

Ni revenis al la stato de "armita interpaco", al la sama ordo, kiu kaŭzis la unuan mondmiliton. La diferenco estas, ke tiam ĉesis la bataloj en atmosfero de esperoj, de kredo pri mondsavaj idealoj. Nun oni finis la duan mondmiliton en abisma malesperoj, disreviĝo, anima premito kaj cinika rilato al ĉiuj proklamoj, devizoj kaj promesoj. Tiam oni almenaŭ kredis je homa bona volo kaj je ebleco establi pli bonan kaj

pli justan mondordon. Hodiaŭ oni insulte mokas ĉiun naivulon, kiu kuraĝas kredi kaj anoncas sian kredon.

Tio estas la *puno*.

La generacio, kiu per nenionfaro permesis al sovaĝaj hordoj de 1933 ĝis 1939 kaŭzi malriĉigon, persekuton, plenan sendignigon kaj fine amaselpelon de pacemaj civitanoj, la generacio, kiu inter 1939 kaj 1944 estis intence aŭ nekonscie muta kaj blinda rilate al terura mortbuĉado kaj masakro de ses milionoj de tiuj senlanduloj, la generacio, kiu de la militfino kaj ĝis nun ne rekonas al tiu paria popolo la naturan rajton posedi propran hejmon kaj al tiu hejmo libere reveni — tiu generacio meritas nek veran pacon nek pli justan ordon, nek esperon pri ĝi! Same kruele kiel kondukis la mondo al la dirita gento, same kruele traktos la rekompencema sorto la senkompatan mondon. "Egiptujo fariĝos dezerto kaj Edom fariĝos dezerta senvivejo, ĉar ili premis la idojn de Jehuda kaj verŝis senkulpan sangan en sia lando... Kaj mi venĝos pro ilia sango, kiu ne estis venĝita de Mi..." (Joel 3).

Jes, jes! La generacio, kiu buĉis, sufokis, kaj per gaso venenis homojn, enterigis ilin vivaj kaj faris el ili *sapon*, dum aliaj homoj de malproksime ne reagis aŭdante pri tiuj kanajlaĵoj, tiu generacio estas de sia sorto laŭmerite kondamnita al malespero, pacomanko, mallumo kaj pereco. "Por malpiuloj, diras la Eternulo, *ne ekzistas paco!*" (Jesaja 48).

Jam ŝvebas super niaj kapoj la larĝflugila anĝelo de Pereco. Li mokamare ridas, minacante la mondon per la plej granda mistera teruro, kiun la plej rafinita homa krekapablo vokis al agado. Kiel la fabela eta ŝtelisto el Bagdad, kiu okazis rompis antikvan vazon kaj liberigis al agado gigantan satanan spiriton, kiu estis preta tuj dispremi sian liberiginton, same staras nun la senpova mondo antaŭ la liberigita kosma forto, preta fortiri nin en Inferabismion. Estas tio la plej malica moko de la sorto; la krea genio de la homspirito alportis mem al la homaro la eblecon de pereco!

Kiu estas trompata de vantaj pacorcvoj? Vidu: ŝakale ĝembojas maŝinpafiloj sur la vastaj ĉinaj rizkampoj, en hindocinaj ĝangaloj, en la naturdotitaj hindoneziaj insuloj, sur

la verdaj bordoj de Gango. Dance festenas sian triumfon la mortfalĉisto en la naskoloko de la muzoj, en la belega Hellas, ĉe la piramidoj apud Nilo, en la malriĉaj havenkvartaloj de Triesto kaj inter la florantaj valoj de Saron kaj Jordano. De Balta maro ĝis la fino de Balkano, de la persaj oleofontoj ĝis la manĉuraj limoj, sur ambaŭ flankoj de fiksita zono staras militpretaj batalfortoj de du gigantaj mondpotencoj, ne povantaj kontentige dividi sian komunan militakiron.

Kial ĝis nun zumas kugloj, kiuj traboras senesperigitajn homkorojn? Ĝis nun: unu jaron kaj duonan post la militfino?

Ĉar ankoraŭ pli ol trionmiliono da homoj saviĝintaj el la pereoflamoj, sen patrujo, sen hejmo kaj sen familia angulo, iom post iom degeneras, malliberigitaj en suferkoncentrejoj en Germanujo, Aŭstrio, Italujo kaj Cipro, malantaŭ pikdrataj bariloj, gardataj de armitaj soldatoj (nun anglosaksaj!) por ke ili, Dio gardu, ne revenu al sia historia patrujo! Ĉar ĝis nun sur ĉiuj eŭropaj vojoj kaŝe vagas dekmiloj da senhejmaj senlandanoj, pelataj de antihoma kruelo (stulterare nomata antisemitismo!) marŝantaj piede el la polaj sengrenaj kampoj al sudaĵ havenurboj — dum la tuta militŝiparo de la plej granda marpotenco bare gardas ilian vojon al ilia lasta rifuĝejo. Kaj kiam ili sukcesas enŝipiĝi en etajn kuvboatojn kaj per siaj lastaj fortoj remas trans la ondomuĝan Mezan maron al la bordoj de la Lando Promesita, ĉasas ilin kanonriĉaj krozoŝipoj por forkonduki ilin al nova sklaveco por daŭra degenerado. Kaj la tuta mondo vidas kaj silentas. Silentas demokratioj, silentas la socialismo (ĝi mem partoprenas tiujn krimojn), silentas la organizita proletaro, silentas pacismo, la esperantistaro kaj ĉiuj aliaj ismoj, politikaj, sociaj, kulturaj kaj bonfaraj...

Ne, ne! Tia mondo meritas nek pacon nek savon. "Nur viaj krimoj estis disigilo inter vi kaj via Dio, kaj viaj pekaj kovris antaŭ vi Lian vizaĝon, por ke Li ne aŭdu. Ĉar viaj manoj estas makulitaj per sango kaj viaj fingroj per krimo; via buŝo parolas malveron, via lango esprimas maljustaĵon..." (Jesaja 59).

Ĝuste tial la senpovaj profesiaj mensoguloj, la politikistoj, provas vane per vortabundo digi la alvenan superakvegion.

Iliaj cinikaj trompoj kaj senenhava babiltorento laŭte sed vane eĉas en la luksaj politikaj salonegoj, kie ili fanfarone supozas formi la homsorton, dum tiu sarkasme mokridas al ili. "Oni kovas ovojn de vipuro, kaj oni teksas aranaretojn." (Samloke 59). Tial ĉiu el iliaj paroladoj disvolvas novajn komplikaĵojn de malvero kaj elkatenuigas novajn malbonfortojn, ĉiu el iliaj esprimoj elvokas novajn malpacaĵojn kaj ekflamigas reciprokajn malfidon, suspekton kaj malamon. La konstantaj disputoj ne povas estingi la malamon, ĉar ĉiu nova vorto estas superplena de serpentosiblo kaj aldona porcio da veneno. La tuta mondpolitika teatraĵo ŝajnas esti la plej sensukcesa tragikomedia farso iam prezentita sur la arĉo de la homarhistoria cirko.

Jaro sekvas jaron. Dum ilia gardinterŝanĝo sorĉas la malfeliĉaj, blindaj homoj sinforĝeson en la haladzo de silvestronoktaj diĥoĉoj. Sed eĉ super la plezurebriaĵoj kapoj ŝvebas la malbeno de morgaŭmatena vekigo, disreviĝo kaj pensosobriĝo, kiam oni estos devigata preni sur la ŝultrojn la tutan ŝarĝon de respondeco kaj la konsekvencojn.

Ne ekzistas loko al kiu forkuri de tiu malbeno. "Repago pro la sango!" — jen la devizo de la sorto. Ĝis kiam ekzistas mizero per glavo aŭ malamo elvokita, ĝis kiam krias senkulpa sango surteren verŝita, envenos nek Beno de kvicto nek Paco de interfratiĝo sub la tegmenton de la homa loĝejo!

La vojo al rebonigo ne estas per floroj sternita. Ne facile estas deturniĝi de peka vojo. Tial penas la malfeliĉuloj nei sian kulpon, rifuzos sincere konfesi siajn krimojn, konscie rifuzos rekoni sian respondecon. Evidu tiun falsan vojon!

Malfermu la okulojn por klare vidi: sur via falanta muro la fajrofringa mano jam loĝeble skribis la epitafon: *Mene, mene, tuteĉ ufarsin.*

Jerusalem 3.1.1947.

## Richard Wright

De STELLAN ENGHOLM



Richard Wright

Richard Wright (Riĉerd Rajt) estas en la unua vico de la usonaj aŭtoroj kaj la unua inter la negraj. Li naskiĝis 1909 en la ŝtato Mississippi, vivis en sia infanaĝo en granda mizero kaj ĉiama malsato, vivtenis sin mem de sia dekkvina jaro, laboris en multaj fakoj, fariĝis fine gazetisto kaj verkisto. En 1938 aperis lia unua libro *Uncle Tom's Children* (Idoj de Onklo Tom). Ĝi gajnis la unuan premion en konkurso aranĝita de revuo. En 1940 aperis *Native son* (proks.: Filo de la lando), kiu donis al li lokon inter la grandaj aŭtoroj kaj konigis lian nomon tra la mondo.

La verkoj de Wright temas pri la vivo de negroj kaj iliaj problemoj. La ĉeftemo de la verkoj estas la rilato inter blankuloj kaj negroj. La negroj de Usono estas subpremita popolo. La pli multaj blankuloj rigardas la negrojn kiel tre malaltnivelajn estaĵojn. Homvaloro ĉe negroj, egaleco kun blankuloj, ŝajnas al ili absurda afero. Laŭ tiuj konceptoj oni ankaŭ traktas la negrojn. *Ili ankoraŭ estas sklavoj.*

(Parenteza ekzemplo el alia fonto: Speciala korespondantino de la granda sveda kooperativa revuo en la fino de 1946



vizitis karbminejan vilaĝon ne malproksime de Pittsburg. Mi citas: "En kunligo kun la granda striko 1922 venis tien negroj el la sudo, logataj tien kiel strikrompantoj kaj tial malamike rigardataj. "Ili ne komprenis pli bone tiutempe, sed nun ili pensas alie, aliĝis al la sindikato kaj bone rilatas al ni", diris iu el la ministoj. Kiom bona estas tiu rilato — blanka familio neniam ekhavas la penson viziti negran familion, nek kontraŭe. La blankaj kaj nigraj infanoj vizitas la saman lernejon sed neniam interrilatas ekster ĝi. La negroj ne rajtas fariĝi membroj de la konsumkooperativo. Ili ne ricevas eĉ ordinaran kvarprocentan repagon, kiun ricevas aliaj nemembroj. Neniu trovas ion nedemokratian en tio. "Nu, ne gravas listigi tion, kion aĉetas negro", diras la estro de la butikoj en Sutersville kaj aldonas: "Ĝis antaŭ kelkaj jaroj ili ne rajtis eniri trinkejon. Nun ili rajtas; t. e. ekzistas leĝo, kiu malpermesas al la posedanto elpeli ilin, sed la pli multaj ne eniras, ili tro timas." La estro, la komizoj kaj la prezidanto de la societo rigardas min kiel tre kuriozan estaĵon, ĉar mi povas supozi tian ulon, kia estus nigra kooperativano. Ili opinias, ke la afero ne valoras respondon. "Nu, ni neniam miksiĝas. Kaj cetero negroj ne estas fidindaj.")

Tiel estas en la nordo, kie la stato tamen estas senkompare pli bona ol en la sudo.

Homoj ĉiam rigardataj kaj traktataj kiel malplivaloraj havas aŭ ricevas konstantan senton de malplivaloro. Ili estas konsiderataj kiel sklavo, tamen la plej terura estas, ke *ili mense estas sklavo*. Tiun sklavan menson, sklavan manieron rigardi la mondon Wright multloke timige priskribas. La personoj en la libroj de Wright havas preskaŭ nenion krom sufero komune kun la dimanĉerneaj figuroj en La dometo de Onklo Tom. Ili vere estas malaltnivelaĵoj, ĉiurilate, kaj ne estas agrable legi pri ili.

En Native Son Wright rakontas pri negra junulo, kiu fariĝas krimulo. Li estas ne evoluinta, kun terura temperamento, figuro el subtavolo de la homa socio. Akcidente, sen tion intenci, li mortigas filinon de riĉulo, ĉe kiu li la saman tagon dungigis kiel ŝoforo kaj domservisto. En timo li metas la kadravron en la fajrujon de la centra hejto kaj forbruligas ĝin.

Oni tamen baldaŭ malkovras la krimon kaj la junulo fuĝas. Poste li mortigas ankaŭ negran knabinon, kun kiu li interrilatas, pro timo, ke ŝi povos perfidi lin. Post longa, terura ĉasado li estas arestata. Oni metas lin en malliberejon, kaj proceso komenciĝas.

La proceso montras la plej malbelajn flankojn de blankula menso. Al la akuza advokato kaj la blankaj homamasoj la junulo estas nur venena bestaĉo, de kiu oni devas kiel eble plej rapide liberigi sin. Juda advokato provas savi lian vivon. La junulo estas krimulo, estas spirite tre malaltnivela homo. Sed kial li estas tia? Lia cirkaŭmondo faris lin tia, kaj pri tiu cirkaŭmondo estas respondaj la blankuloj. Troviĝas milionoj da similaj nigraj homoj. Ĉu oni iom ajn plibonigas por ili la ĉirkaŭmondon kaj ĝenerale sekurigas trankvilan socian vivon per mortigo de tiu negra krimulo? Estas demando gravega por la tuta socio. La advokato tamen ne sukcesas savi lian vivon.

Estas terura libro en sia priskribado, estas terura libro kiel prezento de la negra problemo. Sed ĝi estas terura ankaŭ en alia rilato. Iu aŭ iuj komparis Native Son kun Krimo kaj Puno de Dostojevskij. Raskolnikov estas spirite evoluinta, klarpenza homo, kiu faras la eksperimenton por sia kaj por ĝenerala utilo nuligi senton kaj koncepton pri justo. Li ne sukcesas. Lia konscienco ekparolas, kaj li trovas sin pekanto kontraŭ principo pli grava ol tiu de utilo. Estas animoskua libro, kies ĉefdemando ampleksas la tutan homaran ekziston, la sencon de la tuta ekzisto.

En Native Son ne ekzistas demando pri justo aŭ ne. Bigger Thomas, la negra junulo, ne havas konsciencon. Li neniel komprenas aŭ sentas, ke li agis kontraŭ ia supera principo. Li mordas, gratas kaj mortigas kiel turmentata kaj kolerigita besto. Mi ne scias, ĉu Wright per tio volas diri, ke la homa konduto dependas sole de cirkonstancoj aŭ ĉu li rekonas en la homa spirita vivo immanentan justoprincipon. Ĉiokaze la justoprincipo ne troviĝas kiel klara koncepto en la interno de ĉiu homo. Kiel ĉio en la ekzisto ĝi dependas de evoluo kaj kulturado. Ekzistas tiaj homoj, kia estas Bigger Thomas. Rilate al justosento ili staras proksime al la bestoj. La tute

senkonsciencia tipo de Bigger Thomas certe estas neofta, sed se cirkonstancoj malhelpas kulturadon de justosento, la homoj povas facile reiri al tiu stato. Ekzemploj troviĝas en Germanujo kaj aliloke en la mondo.

Tiuj problemoj, kiuj sekvas el la enhavo de *Native Son*, montras terurajn perspektivojn kiel eblajn. Ili estas gravegaj, ne nur por la negra demando de Usono sed por la tuta homaro.

En *Black Boy* (Nigra Knabo), kiu aperis en la pasinta jaro, rakontas Wright pri siaj infanaĝo kaj junaĝo. La rakontmaniero, same kiel en *Native Son*, estas pure epika, tamen en *Black Boy* ankoraŭ pli koncentrigita. Oni ofte pensas pri la plej grandaj epikuloj en la mondo, la islandaj verkistoj de la antikva tempo.

En *Black Boy* troviĝas multaj priskriboj de negra vivo, kaj kiel dirite ili ne similas al tiuj de *La domo de Onklo Tom*. Blankuloj ofte asertas, ke negroj estas tute aliaj ol ili. Legante tiun libron mi ofte forĝesis, ke temas pri negroj. En spirita malvasteco, bigoteco, hipokriteco, aĉa servemŝajnigo, superstiĉo kaj multaj aliaj kvalitoj ili estas detalfidele simila al personoj, kiujn mi en mia infanaĝo renkontis tie ĉi en la sveda arbarlando, tiom malproksima de la negra Usono. Sed krom tio troviĝas ĉe la negroj tiu sklavspirito, de kiu mi en mia infanaĝo vidis nur etajn spurojn, tamen renkontis. Ne nur negroj estas sklavspiritaj.

Kiel miraklo en tiu sklavmensa mondo aperas la knabo Richard Wright. Eble influis al li heredaĵo ankaŭ de blankuloj kaj ruĝuloj. Ĉiokaze oni apenaŭ povas imagi pli memstaran kaj liberaman homon. Ankaŭ en tio li frape similas al iamaj islandanoj. Tie ĉi mi ne povas eĉ parte rakonti la enhavon de la libro. Ĉiokaze ĝi estas multrilate unuaranga libro. Ĝi bone samnivelas kun la membiografio de Gorkij kaj estas kelkrilate pli forta.

La libroj de Wright temas pri la negraj problemoj, sed kiel ĉiuj veraj libroj ili krom tio estas universalaj. Tiuj negroj reprezentas homtipojn el ĉiuj landoj kaj rasoj. La problemoj de la negroj reprezentas ankoraŭ pli grandajn problemojn de la tuta homaro.

Wright rakontas epike. Li ne donas proponojn pri plibonigo. La faktoj parolu al ni kaj igu nin pensi, kompreni, agi. Kaj antaŭ ĉio tio koncernas la negrojn mem. La liberamo kaj memstareco de Wright mem estas plej bona ekzemplo por ili. Nur per propraj penadoj kaj fortoj la negroj fariĝos vere liberaj kaj memstaraj homoj. Sed al tiu celo povos multe kunhelpi homeca sinteno de la blankuloj.

La rakonto el *Black Boy*, kiu sekvas tie ĉi, ŝajnas al mi bone reprezentu unu flankon de blankula rilato al negroj. Olin kaj liaj blankaj kamaradoj, kiuj interbatigas la negrajn junulojn kaj same facile, sen konsciencia riproĉo, povus igi ilin mortigi unu la alian, ne faras tion pro malamo, ankaŭ ne pro ia speciala turmentemo. Ili faras tion tute simple pro stulteco. Mankas en ili pensoj, kompreno, rezonado, mankas eĉ la elementoj de kulturita spirita vivo. Ilia plezuro estas plezuro de stultuloj. Olin estas same danĝera kiel Bigger Thomas. Li estas pli danĝera, ĉar tiaj stultuloj ekzistas ege multaj, kaj ĉu subpremantoj ĉu subprematoj ili estas al la ceteraj homoj pli danĝeraj ol la bestosimila sed pli malofta tipo de Bigger Thomas.

---

## El "Black Boy"

De RICHARD WRIGHT

Iun someran matnon mi staris ĉe elverŝujo en la fono de la uzino kaj lavis paron da okulvitroj, kiuj ĵus venis de la polurmaŝinoj, kies vibro tremigis la plankon, sur kiu mi staris. Apud ĉiu maŝino kliniĝis blanka viro, atente laboranta. Tra fenestro maldekstre de mi enfluis sunlumo, kiu lumigis la makulojn de polurpulvoro kaj donis al la uzino aspekton akrebrikan, furiozan, danĝeran. Tagmezo proksimiĝis, kaj mia menso tiriĝis al mia ĉiutaga lunĉo de sandviĉo kap saketo da ternuksoj. Estis laŭskema tago, pli malpli simila al aliaj tagoj, kiujn mi en tiu laboro pasigis kiel kurknabo aŭ lavisto de

okulvitroj. Mi estis en paco kun la mondo, tio estas, en paco en la sola maniero en kiu nigra junulo en la Sudo povas esti en paco kun mondo de blankaj homoj.

Eble estis la nura ĉiutageco, kiu baldaŭ faris la tagon aparta de aliaj; povas esti, ke la blankuloj, kiuj prizorgis la maŝinojn, sentis turmenton pro siaj tedaj, aŭtomataj taskoj, kaj sopiris ian vigligon. Ĉiokaze mi jen aŭdis paŝojn malantaŭ mi kaj turnis la kapon. Apud mi staris juna blanka viro, sro Olin, plej proksima estro super mi. Li ridetis kaj rigardis min, kiam mi forigis smergopulvoron de okulvitroj.

— Kiel prosperas, knabo? li demandis.

— Ho, bonege, sinjoro! mi respondis kun ŝajnigita afablo, rapide uzante la ŝablonon de "nigrulo estas bonhumora knabo en ĉesto de blankulo", ŝablonon en kiun mi nun povis facile engliti; tamen mi demandis min, ĉu li ion kritikindan trovas en mia laboro.

Senvorte li restis apud mi. Kion li deziras? Estis neordinare, ke li tiel staras kaj observas min. Mi deziris rigardi lin sed samtempe timis.

— Diru, Richard, ĉu vi kredas ke mi estas via amiko? li demandis.

La demando estis tiom ŝargita de danĝero, ke mi ne povis tuj respondi. Mi apenaŭ konis Olin. Mia rilato al li estis tipa rilato de negroj al sudaj blankuloj. Li ordonis al mi, kaj mi diris "Jes, sinjoro" kaj obeis lin. Jen li subite demandas, ĉu mi kredas, ke li estas mia amiko; kaj mi sciis, ke ĉiuj sudaj blankuloj imagas, ke ili estas amikoj de nigruloj. Serĉante respondon, kiu nenion diru, mi ridetis.

— Mi volas diri, li persistis, ĉu vi kredas, ke mi estas via amiko?

— Nu, mi respondis trans la vastan rasan faŭkon inter ni, mi esperas, ke jes.

— Mi estas, li diris emfaze.

Mi laboris plu, demandante min, kiaj motivoj lin instigas. Jam vekigis en mi suspekto.

— Mi volas diri ion al vi, li diris.

— Jes, sinjoro, mi diris.

— Ni deziras, ke ne okazu al vi malbono, li deklaris. Ni tie ĉi ŝatas vin. Vi kondutas kiel bona knabo.

— Jes, sinjoro, mi diris. Kio ne estas en ordo?

— Vi ne meritas veni en malfacilaĵon, li daŭrigis.

— Ĉu mi faris ion, kion iu ne ŝatas, mi demandis, dum mi terurpelate ekzamenis ĉiujn miajn faritajn agojn, taksante ilin laŭ pensoj de sudaj blankuloj rilate al agmanieroj de negroj.

— Nu, mi ne scias, li diris kaj paŭzis, lasante la vortojn enhavozeze penetri en mian menson. Li bruligis cigaredon. — Ĉu vi konas Harrison?

Li aludis al negra junulo de proksimume mia aĝo, kiu laboris en rivala optika firmo trans la strato. Harrison kaj mi konis preterpase unu la alian, sed inter ni ne okazis eĉ plej eta malpacigo.

— Jes, sinjoro, mi diris, mi konas lin.

— Bone, estu singarda, diris Olin. Li embuskas kontraŭ vi.

— Kontraŭ mi? Pro kio?

— Li terure malamas vin, deklaris la blankulo. Kion vi faris kontraŭ li?

Mi forĝesis la okulvitrojn, kiujn mi estis lavanta. Miaj okuloj esploris la vizaĝon de Olin, kaj mi provis trovi, kion li intencas. Ĉu estas io serioza? Mi ne fidis la blankulon, nek Harrison. Negroj, kiuj laboris en la Sudo, ĝenerale estis lojalaj al siaj blankaj laborestroj; ili sentis, ke tio estas la plej bona maniero sekurigi sian laboron. Ĉu Harrison kredis, ke mi iel minacas lian laboron? Kiu estis mia amiko: la blanka viro aŭ la negra junulo?

— Mi faris nenion kontraŭ Harrison, mi diris.

— Nu, vi estas prudenta, se vi atentis pri tiu nigrulo Harrison, diris Olin nelaŭte kaj konfidence. Antaŭ tempeto mi iris malsupren por trinki coca-cola, kaj ĉe la dompordo atendis vin Harrison kun tranĉilo. Li demandis min, kiam vi venos malsupren. Diris, ke li kaptos vin. Diris, ke vi nomis lin per malbela nomo. Nu, ni ne deziras batalon aŭ sangilverŝon en la laborejo.

Mi ankoraŭ dubis pri la blankulo, tamen pensis, ke Harrison eble vere interpretis kiel insulton ion, kion mi diris.

— Mi devas renkonti tiun junulon kaj paroli kun li, mi diris el miaj pensoj.

— Ne, pli bone ne, diris Olin. Estus pli bone, se iu el ni blankuloj parolus kun li.

— Sed kiel tio komenciĝis? mi demandis, ankoraŭ dubante sed duone kredante.

— Li ĵus diris al mi, ke li repagos al vi, vundos vin kaj donos al vi instruon, li diris. Sed ne maltrankvilu. Lasu al mi aranĝi tion.

Li frapetis mian ŝultron kaj reiris al sia maŝino. Li estis grava homo en la fabriko, kaj mi ĉiam respektis lian vorton. Li rajtis ordoni al mi fari tion aŭ tion. Nu, kial li ŝereu kun mi? Blankuloj ne ofte ŝercis kun negroj, tial estis grava tio, kion li diris. Mi estis konfuzita. Ni negraj junuloj laboris longajn penigajn horojn por malmultpenca salajro, kaj ni estis facile inciteblaj kaj nerve streĉitaj. Eble tiu freneza Harrison volis ataki min. Mia apetito malaperis. Mi devis aranĝi tiun aferon. Blanka homo enpaŝis en mian delikate ekvilibritan mondon kaj renversis ĝin, kaj mi devis reĝustigi ĝin, antaŭ ol mi povos senti min sekura. Jes, mi volis iri rekte al Harrison kaj demandi lin, pri kio temas, demandi kion mi diris, kio ofendis lin. Harrison estis nigra, kaj tia estis mi. Mi ignoras la averton de la blankulo kaj parolos rekte al junulo de mia propra koloro.

Tagmeze mi transiris la straton kaj trovis Harrison sidanta sur kesto en la teretaĝo. Li estis manĝanta lunĉon kaj leganta popularan revuon. Kiam mi proksimiĝis, li metis sian manon en la poŝon kaj rigardis min kun malvarmaj, observaj okuloj.

— Diru, Harrison, pri kio temas ĉio ĉi, mi demandis, singarde starante kvar futojn de li.

Li rigardis min longe kaj ne respondis.

— Mi faris nenion kontraŭ vi, mi diris.

— Kaj mi havas nenion kontraŭ vi, li murmuris, ankoraŭ singarde. Mi ĝenas nenion.

— Sed Olin diris, ke vi transvenis al la fabriko tiun ĉi matenon, kun tranĉilo kaj serĉante min.

— Ho, ne, li diris, nun pli trankvila. La tutan tagon mi

neniam estis en via fabriko. — Li ne rigardis min, kiam li parolis.

— Kion Olin tiukaze volis diri? mi demandis. Mi ne estas kolera kontraŭ vi.

— Jen, mi kredis, ke vi serĉas min por vundi min, klarigis Harrison. Olin transvenis tien ĉi en la mateno kaj diris, ke vi mortigos min per tranĉilo, tuj kiam vi ekvidos min. Li diris, ke vi estas kolerega kontraŭ mi, ĉar mi vin insultis. Sed mi diris nenion pri vi. — Ankoraŭ li ne rigardis min. Li levis sin.

— Kaj mi diris nenion pri vi, mi diris.

Fine li rigardis min, kaj mi sentis pli agrable. Ni du negraj junuloj, ĉiu laboranta por dek dolaroj semajne, fiksrigardis unu la alian, pensis, konsideris la motivojn de la blanka viro, ĉiu el ni demandante sin, ĉu li povas fidi la alian.

— Sed kial Olin rakontu al mi tiajn aferojn? mi demandis.

Harrison klinis sian kapon; li metis sian buterpanon flanken.

— Mi... mi... li balbutis kaj tiris el sia poŝo longan, brilan poŝtranĉilon, la klingo estis jam elfaldita. — Mi ĝuste atendis por vidi, kion vi faros al mi...

Min senforte apogis min kontraŭ muro, sentis min malsana, kun la rigardoj sur la akra ŝtalkingo de la tranĉilo.

Vi estis min tranĉonta? mi demandis.

— Se vi estus tranĉinta mia, mi estus tranĉinta vin unue, li diris. Mi prenas neniujn riskojn.

Ĉu vi estas kolera kontraŭ mi pro io? mi demandis.

— Homo, mi estas kolera kontraŭ neniu, diris Harrison ne-trankvile.

Mi sentis, kiel proksime distranĉo ĵus minacis min. Se mi subite estus veninta proksime al Harrison, li estus kredinta, ke mi volas mortigi lin, kaj li estus puŝinta la tranĉilon en min, eble min mortiginta. Kaj kiom signifas, se unu nigrulo mortigas alian?

— Atentu! mi diris. Ne kredu, kion diras Olin!

— Mi nun komprenas, diris Harrison. Li faras adan ŝercon pri ni.

— Li provas igi nin pro nenio mortigi unu la alian.

— Kial li deziras tion fari? demandis Harrison.

Mi skuis la kapon. Harrison sidis sed ankoraŭ ludis per la nefermita tranĉilo. Mi komencis dubi. Ĉu li vere estas kolera kontraŭ mi? Ĉu li atendas, ĝis mi turnos la dorson al li, por tiam trapuŝi min? Estis turmento.

— Mi supozas, ke estas plezuro por blankuloj vidi nigrulojn interbatali, mi diris kun provola rido.

— Sed vi estus povinta mortigi min, diris Harrison.

— Al blankuloj ni estus kiel hundoj aŭ kokoj, mi diris.

— Mi ne deziras tranĉi vin, Harrison diris.

— Kaj mi ne deziras tranĉi vin, mi diris.

Starante sekurdistance unu de la alia ni diskutis la problemon kaj decidis, ke ni silentu pri nia interparolo. Ni ne malkaŝu al Olin, ke ni scias, ke li instigis nin batali. Ni interkonsentis, ke ni ignoru pluajn provokojn. Je la unua horo mi reiris al la fabriko. Olin atendis min, kun signifplena teniĝo kaj serioza vizaĝo.

— Ĉu vi renkontis tiun nigrulon Harrison? li demandis.

— Ne, sinjoro, mi mensogis.

— Nu, li ankoraŭ havas tiun tranĉilon por vi, li diris.

Li streĉe rigardis min. Sed mi konservis la vizaĝon senmova.

— Ĉu vi aĉetis tranĉilon? li demandis min.

— Ne, sinjoro, mi ne timas, mi diris.

— Nigrulo, vi estas idioto, li diris sputparole. Mi kredis, ke vi havas iom da prudento! Ĉu vi toleros, ke tiu nigrulo eltranĉos vian koron? Lia estro donis al li tranĉilon por uzi kontraŭ vi! Prenu tiun ĉi tranĉilon, nigrulo, kaj ne plu kondutu freneze!

Mi timis rigardi lin; se mi estus rigardinta lin, mi estus devinta diri al li, ke li lasu min sola, ke mi scias, ke li mensogas, ke mi scias, ke li ne estas mia amiko, ke mi scias, ke li nur ridus, se iu puŝus tranĉilon tra mia koro. Li estis mia estro, kaj li povus pafi min, se mi ne plaĉus al li. Li metis malfermitan tranĉilon apud la randon de sia laborstablo, ĉirkaŭ unu futon de mia mano. Traflugis min deziro ekpreni ĝin kaj redoni ĝin al li, kun la pinto unue en lian bruston. Sed mi faris nenion tian. Mi prenis la tranĉilon kaj metis ĝin en mian poŝon.

— Jen vi kondutas kiel nigrulo kun ioma prudento, li diris.

Kiam mi laboris, sro Olin observis min de sia maŝino. Poste, kiam mi preterpasis lin, li vokis min.

— Jen atentu, knabo, li komencis. Ni diris al tiu Harrison ne veni en tiun ĉi domon kaj ne ĝeni vin, komprenite? Sed mi ne povas protekti vin, kiam vi iras hejmen. Se tiu nigrulo atakos sur via vojo hejmen, vi trapuŝos lin, antaŭ ol li povos trapuŝi vin, ĉu komprenite?

Mi evitis rigardi lin kaj restis silenta.

— Agu laŭplaĉe, nigrulo, diris Olin. Sed ne diru, ke mi ne avertis vin!

Mi devis iri mian rondon por liveri okulvitrojn, kaj mi ŝtelis kelkajn minutojn kaj transkuris la straton por paroli kun Harrison. Li estis maldolĉmiena kaj retirema, deziris fidi min sed timis. Li rakontis, ke Olin estis telefoninta al lia estro kaj dirinta, ke li diru al Harrison, ke mi intencas atendi lin je la sesa horo ĉe la malantaŭa pordo de la domo kaj tie trapuŝi lin. Estis malfacile al Harrison kaj mi rigardi unu la alian; ni estis konfuzitaj kaj suspektemaj. Ni ne estis vere koleraĵ unu kontraŭ la alia; ni sciis, ke la idcon de mortigo plantis en nin la blankaj viroj, kiuj nin okupis. Ni ree kaj ree diris al ni, ke ni ne samopiniis kun la blankaj viroj; ni instigis nin fidi unu al la alia. Tamen profunde en ĉiu el ni restis suspekto, ke eble unu el ni provos mortigi la alian.

— Mi ne estas kolera kontraŭ vi, Harrison, mi diris.

— Mi volas batali kontraŭ neniu, diris Harrison ĝenite, sed li tenis sian manon en la poŝo sur la tranĉilo.

Ĉiu el ni same hontis, sentis kiel stultaj kaj senfortaj ni estas sub la rego de la blankaj.

— Mi deziras, ke ili lasu nin, mi diris.

— Ankaŭ mi, diris Harrison.

— Troviĝas miliono da negroknaboj similaj al ni por kurtaskoj, mi diris. Estus negrave al ili, se ni mortigus unu la alian.

— Mi scias, diris Harrison.

Ĉu li ŝajniĝis? Mi ne povis fidi lin. Ni ludis per la ideo de mortigo ne pro kaŭzo, kiu troviĝis en nia propra vivo, sed pro tio, ke niaj regantoj metis tiun ideon en niajn mensojn.

Ĉiu el ni dependis de la blankaj pro la pano, kiun ni manĝis, kaj verdire ni pli fidis la blankulojn ol unu la alian. Tamen troviĝis en ni sopiro fidi homojn de nia propra koloro. Denove Harrison kaj mi disiĝis, promesante, ke ni ne lasu influo nin de tio, kion diros niaj blankaj estroj.

Dum semajno daŭris la ludo inciti Harrison kaj mi al batalo, al tranĉado. Ni timis diri al la blankuloj, ke ni ne kredas ilin, ĉar tio egalus diri, ke ili mensogas, aŭ riski diskuton, kiu povus fini per perforto kontraŭ ni.

Iun matenon kelkajn tagojn poste Olin kaj grupo da blankuloj venis al mi kaj demandis, ĉu mi konsentas ĉesigi mian malpacon kun Harrison per laŭregula boksado. Mi diris, ke mi ne timas Harrison, sed mi ne deziras batali kontraŭ li, kaj mi ne scias boksi. Mi nun sentis, ke ili scias, ke mi ne kredas ilin.

Kiam mi tiun vesperon forlasis la fabrikon, Harrison alkriis min de la ekstremo de la kvartalo. Mi atendis, kaj li kuris al mi. Ĉu li intencas tranĉi min? Mi retiris min, kiam li proksimiĝis. Ni ridetis maltrankvile kaj stulte unu al la alia. Ni parolis bezite, elektante niajn vortojn.

— Ĉu ili deziris, ke vi bokse batalu? demandis Harrison.

— Jes, mi diris, sed mi ne konsentis.

La vizaĝo de Harrison vigliĝis.

— Ili deziras, ke ni faru kvar vicojn por kvin dolaroj al ĉiu el ni, li diris. Homo, se mi havus kvin dolarojn, mi povus partopage aĉeti kostumon. Kvin dolaroj estas por mi preskaŭ duonsemajna salajro.

— Mi ne deziras, mi diris.

— Ni ne difektos unu la alian, li diris.

— Sed kial fari tian aferon por blankuloj?

— Por akiri tiujn kvin dolarojn.

— Tiom mi ne bezonas kvin dolarojn.

— Ha, vi estas stulta, li diris. Poste li subite ridetis.

— Jen atentu, mi diris. Eble vi estas kolera kontraŭ mi...

— Ne, mi ne estas. Li forte skuis la kapon.

— Mi ne deziras batali por blankuloj. Mi ne estas hundo aŭ koko.

Mi ekzamene rigardis Harrison kaj li same min. Ĉu li vere deziras batali kontraŭ mi pro iu propra motivo? Aŭ ĉu estas la mono? Harrison rigardis min rigide kaj konsternite. Li paŝis al mi kaj mi forpaŝis. Li nerve ridetis.

— Mi bezonas tiun monon, li diris.

— Estas egale, mi diris.

Senvorte li foriris, kun kolera mieno. Eble li nun trapuŝos min, mi pensis. Mi devas atenti tiun idioton...

Dum dua semajno la blankuloj en ambaŭ fabrikoj petis nin batali. Ili faris historiojn pri tio, kion Harrison diris pri mi, kaj kiam ili renkontis Harrison, ili mensogis same al li. Harrison kaj mi estis singardaj, kiam ajn ni renkontiĝis. Ni ridetis kaj restis sekurdistanco, hontante ĉiu pro si mem kaj unu pro la alia...

Denove Harrison vokis min iun vesperon, kiam mi estis survoje hejmen.

— Konsentu batali! li petis.

— Mi ne volas, kaj lasu la petadon! mi diris pli laŭte kaj severe ol mi intencis.

Harrison rigardis min, kaj mi observis lin. Ambaŭ ni ankoraŭ portis la tranĉilojn, kiujn donis al ni la blankuloj.

— Mi deziras partopagi kostumon per tiuj kvin dolaroj, diris Harrison.

— Sed tiuj blankuloj rigardos nin, ridos pri ni, mi diris.

— Kiom signifas! diris Harrison. Ili rigardas vin kaj ridas pri vi ĉiutage, nigrulo.

Estis vere. Sed mi malamis lin pro lia diro. Mi sopiregis frapi lian buŝon, volis lin difekti.

— Kion ni povas perdi? demandis Harrison.

— Nenion, mi supozas, mi diris.

— Certe, li diris. Ni akiru la monon. Estas egale.

— Kaj nun ili scias, ke ni scias, kion ili provis fari al ni, mi diris, malamante min pro la diro. — Kaj ili malamas nin pro tio.

— Certe, diris Harrison. Do ni akiru la monon. Vi povas uzi kvin dolarojn, ĉu ne?

— Jes.

— Ni do batalu por ili.

— Mi sentus min hundo.

— Al ili ni ambaŭ estas hundoj, li diris.

— Jes, mi konsentis. Sed denove mi deziris bati lin.

— Jen, ni superruzu tiujn blankulojn, diris Harrison. Ni ne difektu unu la alian. Ni nur ŝajnigu, ĉu komprenite? Ni montru, ke ni ne estas tiel stultaj, kiel ili kredas, komprenite?

— Mi ne scias.

— Estas nur ekzerco. Kvar vicojn por kvin dolaroj. Ĉu timas?

— Ne.

— Do venu batali!

— Bone, mi diris. Estas nur ekzerco. Mi batalos.

Harrison estis feliĉa. Mi sentis, ke ĉio estas tre stulta. Sed kiom gravis? Mi trapasos tion, kaj tio ĉesigos la aferon. Sed ankoraŭ mi sentis nekularan koleron, kiu ne forlasis min.

Kiam la blankuloj en la fabriko eksciis, ke ni konsentis batali, ilia ĝojo estis senlima. Ili proponis instrui al mi novajn batojn. Ĉiun matenon ili flustre rakontis al mi, ke Harrison manĝas nekuiritajn cepojn por fortiĝi. Kaj Harrison rakontis, ke ili diris, ke mi manĝas nekuiritan viandon por fortiĝi. Ili proponis pagi por mi manĝaĵon ĉiutage, sed mi rifuzis. Mi hontis pro tio, kion mi konsentis fari, kaj mi deziris retiri min de la lukto, sed mi timis, ke ili koleriĝos, se mi tion faros. Se blankuloj pro neniu kaŭzo krom propra plezuro persvadas negrajn junulojn puŝi tranĉilon unu en la alian, ne estus malfacile al ili en koleratako aŭ en pasa sento de trompiĝo direkti plenfortan baton al negra junulo.

La batalo okazis iun sabatan posttagmezon en la teretaĝo de la domo ĉe Main Street. Ĉiu blankulo, kiu ĉeestis la batalon, metis sian kontribuon en ĉapelon, kiu troviĝis sur la betona planko. Nur blankaj viroj rajtis eniri; virinoj aŭ negroj ne havis permeson. Harrison kaj mi estis nudaj ĝis la talio. Brila elektra lampo lumis super ni. Kiam oni ligis la gantojn sur miaj manoj, mi rigardis Harrison kaj vidis, ke liaj okuloj observas min. Ĉu li restos ĉe sia promeso? Dubo faris min nerva.

Ni komencis, kaj tuj mi komprenis, ke mi ne sufiĉe pensis pri tio, kion mi kontraktis. Mi ne povis pretendi, ke mi luktas. Nek Harrison nek mi sciis sufiĉe boksi por trompi por momento

eĉ infanon. Honto plenigis min. La blankuloj fumis kaj kriis al ni maldecaĵojn.

— Nigrulo, frakasu la testiklojn de tiu nigrulo!

— Trafu tiun nigrulon!

— Oŭ, batalu, vi didamnitaj nigruloj!

— Frapu lian koitan parton!

— Eligu lian sangon!

Mi faris teruran maldekstran baton. Harrison trafis alte sur mian kapon, kaj antaŭ ol konsciiĝi pri tio mi per forta dekstrobato trafis la buŝon de Harrison, kaj sango ekfluis. Harrison direktis baton sur mian nazon. La batalo komenciĝis, kontraŭ nia volo. Mi sentis min kaptita kaj hontis. Mi batis ankoraŭ pli forte, kaj ju pli forte mi, des pli forte batis Harrison. Niaj planoj kaj promesoj signifis nun nenion. Ni batalis kvar severajn vicojn puŝante, senteknike batante, gruntante, sputante, blasfemante, kriante, sangante. En niajn batojn eniĝis la honto kaj la kolero pro tio, ke ni lasis nin trompi, sango fluis en niajn okulojn, duone blindigante nin. Nia malamo al la viroj, kiujn ni provis trompi eniĝis en la batojn, kiujn ni direktis unu al la alia. La blankuloj lasis la vicojn daŭri kvin minutojn, kaj ambaŭ ni timis halti kaj demandi pri la tempo, timante baton, kiu surplankigus nin. Kiam ni estis proksimaj al kolapso pro elĉerpiĝo, ili disigis nin.

Mi ne povis rigardi Harrison. Mi malamis lin kaj li malamis min. Mi kunpremis la kvin dolarojn en mia pugno kaj iris hejmen. Post tio Harrison kaj mi evitis kaj malofte alparolis unu la alian. La blankuloj provis aranĝi aliajn batalojn al ni, sed nia prudento sufiĉis por refuzo. Mi aŭdis pri aliaj bataloj aranĝitaj inter negraj junuloj, kaj ĉiam, kiam mi aŭdis pri tio de blankuloj en la fabriko, mi iris el aŭdodistanco. Mi sentis, ke mi faris ion malpuran, ion, pro kio mi neniam povos kontentige pentofari.


Kun permeso de la aŭtoro  
el la angla de *S. Engholm*

## Unika astronomia observejo

Teksto: JOHN MOFFAT, Fotoj: J. MASON


La princo Jai Singh, fondinto de la civito de Jaipur, regis la ŝtaton Jaipur de 1699 ĝis 1743. Li havis specialan emon al la matematika scienco, precipe al astronomio. En tiu fako liaj diligento kaj bona rezonpovo faris lin supera inter la astronomoj de tiu epoko. Ne kontentigis lin la astronomiaj informoj troveblaj en la tiutempaj kalendaroj, kaj trovinte, ke liaj observoj pri la ĉielaj korpoj ne akordiĝas kun la informoj de la kalendaroj, li decidis fari novajn, proprajn tabelojn. Tiucele li konstruis en 1710 tiun strangan observejon, kiu ankoraŭ nuntempe troviĝas en Delhi en Hindujo.

Por antaŭkalkuli la estontajn poziciojn de la ĉielaj korpoj, ilian levigon, subiron ktp, estas necese je diversaj horoj observi iliajn poziciojn rilate al ni kaj iliajn reciprokajn poziciojn. Nuntempe tiaj mezuroj estas farataj per ekzakte konstruitaj angulaj instrumentoj. Jai Singh ne povis konstrui tiajn, ĉar mankis ĉe la metlistoj de tiu epoko la lerto necesa por fabriki kaj gradigi tiajn delikatajn instrumentojn. Tial li starigis en Delhi tiujn konstruaĵojn, kiuj servis al la princo anstataŭ la nuntempaj metalaj instrumentoj. Jen la hindaj nomoj kaj priskribo de liaj "instrumentoj".



Samrath Yantra

*Samrath Yantra* konsistas ĉefe el giganta orta triangulaĵo, nomata gnomono, kaj du arkoj aŭ kvadrantoj. La foto montras la gnomonon kaj la orientan arkon de la instrumento. La gnomono estas 19 metrojn alta, kaj ĝia hipotenuzo, kiu havas ŝtuparon, estas 40 metrojn longa. La hipotenuzo kaj la kvadrantoj estas gradigitaj por obliki determinon de la horangulo ( $1 \text{ horo} = 15^\circ$ ) kaj la dekliniĝon de la ĉielaj korpoj.




Jaiprakash Yantra kaj Rama Yantra

*Jaiprakash Yantra* kaj *Rama Yantra* konsistas el kvar konstruaĵoj kiuj formas du instrumentojn. Antaŭe sur la bildo troviĝas la du partoj de Jaiprakash Yantra. Tiuj partoj kompletigas unu la alian kaj formas unu instrumenton. Jaiprakash Yantra estas tiel konstruita por faciligi mezurojn, permesante al la observanto libere eniri en la internon. La duonsferoj havas diametron de proksimume 5,5 metroj, kaj ili reprezentas la ĉielan sferon. Skaloj estas ankoraŭ videblaj sur la internaj surfacoj de la duonsferoj kaj ankaŭ ĉirkaŭ iliaj randoj. Per tiuj skaloj oni povas determini la altecon, la azimuton kaj la dekliniĝon de ĉiela korpo.

Ankaŭ la instrumento Rama Yantra konsistas el du kunaj partoj, samkaŭze kiel tiuj de Jaiprakash Yantra. La du rondaj



konstruaĵoj estas proksimume 8 metrojn altaj, kaj ĉiu el ili havas centran gradigitan ŝtonkolonon. La ronda planko konsistas el alternaj segmentoj, elradiantaj de la centra kolono ĝis la eksteraj rondaj muroj. La segmentoj de unu konstruaĵo estas konformaj al la spacoj de la alia. La instrumento servas por mezuri la altecon kaj azimuton de ĉiela korpo. Tion oni faras konsiderante la enlinecon de stelo aŭ planedo kun la supro de la centra kolono kaj certa marko sur la ronda muro aŭ la planko, kiuj portas skalojn.



*Misra Yantra*

*Misra Yantra* estas la plej komplikita instrumento kaj formas fakte kvar instrumentojn. La flankaj ekstremaĵoj kune kun la arkoj, kiuj troviĝas tie, formas alian Samrath Yantra, konstruitan el du partoj anstataŭ el unu. Ili havas la saman taskon kiel tiu jam priskribita. La centra gnomono kaj la du grandaj duonrondoj flanke de ĝi formas alian instrumenton. Tiu estas uzata por determini la tagmezono de kvar lokoj en la mondo: de Notke, Japanujo, de Scritchew Pic, insulo en Pacifika Oceano, de Zürich, Svisujo kaj de Greenwich, Anglujo. La kuna Samrath Yantra donas la akordantajn horojn de Delhi. La du aliaj estas malpli gravaj instrumentoj. La orienta arko (dekstre sur la foto) povas esti uzata por eltrovi

altecojn, kaj skalo sur la norda muro (ne videbla sur la bildo) obligas determini, en kiu signo pasas la suno.

Tiajn instrumentojn anstataŭas nuntempe aliaj, kun pli granda ĝusteco. Estas tamen interese ekscii, ke la determinoj haveblaj eĉ nuntempe per la originaj skaloj de la princo, estas de akceptebla valoro.

## Literaturo

AUGUSTENO DE SILVA: *Vivo de Zola*.

Trad. Manuel de Freitas.

Formato: 14,5 × 20,5 cm, 106 p.

Eldonejo: Portugala Eldona Rondo.

Ĉu havas sencon nuntempe verki libron pri la vivo de Zola, ĉu havas sencon traduki tian verkon en esperanton? Legante la libron mi konvinkigis ke jes. Kiel la titolo diras, ĝi temas pri la homo kaj lia vivo. Ĝi do ne estas pure priliteratura verko, kvankam ĝi kompreneble parolas pri la verkado kaj la verkoj de Zola, pri liaj enhavo kaj tendenco. Tio apartenis ja al lia vivo.

La prezentado de la vivo de Zolas estas populara — sed altnivele populara. Mi ne scias, ĉu la prezentado tute respondas al la rezultoj de metodaj literatursciencaj esploroj pri la vivo kaj verkado de Zola. Pli grava ol literatursciencaj subtilaĵoj estas tamen tio, ke la aŭtoro tiel skribas, ke oni nepre interesiĝas, spirite partoprenas la klopodoplenan vivon de la aŭtoro. Klopodoplenta lia vivo estis de komenco ĝis fino, kaj la batalo estis kolosa, ĉar ĝi estis kontraŭ socia kaj privata maljusto, hipokrito kaj stulteco, por libero, justo kaj senĉhava vivo al ĉiuj. Eble li foje estas unuflanka, kiel diris liaj kontraŭuloj, foje eraras, foje tro bele revas pri la homoj kaj pri la signifo de novaj sociaj organizformoj — lia batalo estis sincera kaj honesta de komenco ĝis fino. Tial li ne nur meritas, ke ni memoru lin; lia vivo kaj batalo donas inspiron kaj forton al ni.

Kiam mi estis infano kaj junulo mi legis kelkajn verkojn de Zola. Poste mi nenion legis de li, ĉar lia verkadmaniero ne plaĉis al mi, ŝajnis al mi tro detalpriskriba, teda. Leginte la malgrandan libron mi nun nepre trastudos almenaŭ kelkajn librojn de li. Estu tio mia atesto pri la libro de de Silva.

Lingvaj eraroj kaj nebonaĵoj estas relative maloftaj, kaj mi ne trovas bezonate citi ilin. La papero estas ne bona, sed tio ne timigu vin: la papero finfine ne estas la ĉefa en libro.

**J. H. ERKKO: Spegulo Homarana.**

Trad. Vilho Setälä.

Prezo 25 fmk, afrankite 28 fmk.

Eldono Vilho Setälä, Helsinki.

Sur reklama folio diras la eldonisto: "La celo de la aperigo de ĉi tiu libro estas duobla: unue ĝi volas anonci la estiĝon de esperanta eldonejo en Finnlando, kaj due ĝi disiras en la tutan mondon por esprimi la deziron de la finna esperantistaro partopreni en la kunlaboro de la popoloj por kreo de paca kaj pli feliĉa homaro — — —."

Ĝi bone plenumas ambaŭ taskojn. La volumeto enhavas dek poemetojn kaj resumeton pri la poeto, kio povas ŝajni iom malmulte. Tamen la libreto valoras la prezon. Ĝi estas el libroarta vidpunkto unuaranga kaj bone atestas pri finnaj gusto kaj presarto. Vinjetoj de la fama finna pentristo Akseli Gallén-Kallela ornamas la paĝojn.

La duan taskon ĝi kiel dirite plenumas per malmulte da vortoj. Tamen pli grandaj libroj ofte havas malpli da enhavo. La vivreguloj, kiujn la poeto en la komenco de tiu ĉi jarcento prezentis al sia popolo, taŭgas ankaŭ por la homaro.

Post tiu bela kaj bona naskiĝodokumento de la nova eldonejo ĝi baldaŭ aperigos **Sep Fratojn** de Kivi. Tiu libro estas ne nur la ĉefverko de la finna literaturo sed ankaŭ (kvankam alilande ordinare nekonata) unu el la ĉefverkoj de la mondliteraturo.

#### **Literatura Mondo**

denove aperis, per la numeroj 1—2 (unu kajero) de sia tria periodo. Ĝi bone konservas la nivelon de la antaŭmilita tempo kun la granda budapesta literatura ekspansio. La literaturaj gvidantoj reprenis siajn postenojn por daŭrigi sian laboron.

La revuo aperos en amplekso de 16 p. monate (provizore en ĉiu dua monato en duobla amplekso), en formato de 29 × 20 cm. Jara-bono estas 2,50 USAdolaroj aŭ egalvaloro. Revendas ĝin la pli multaj landaj libroservoj.

Literaturo estas grava por ĉiu lingvo, ĉiu kulturo. Por la esperanta popolo ĝi estas proporcie pli grava ol por iu alia. Tial ni kun ĝojo salutas la reaparon de la sola kaj multinflua literatura revuo en esperanto.

S. E.